

# Espero Katolika



**Numero 7-9/2010**

**Julio-Septembro 2010**



**Sur la kovrilo:** Grupo de IKUE-kongresanoj fronte al la Baziliko de Montmartre en Parizo: la franca ĉefurbo gastigas la Jubilean Kongreson de nia Unuiĝo, kiu solenis sian 100-jariĝon.

## ENHAVO

### ONI SOLENIS EN PARIZO LA CENTJARIĜON DE IKUE

#### Raporto pri la 63-a Kongreso de IKUE

|   |    |
|---|----|
| <b>La Kongresejo</b>  | 43 |
| <b>Lundon:</b> Inaŭguro kun mesaĝo de la papa Konsilio por Laikoj kaj bonvenigo de la Prezidanto de IKUE  | 44 |
| Vizito “al sankta Petro”  | 45 |
| <b>Mardon:</b> La ronda tablo kaj prelego pri p. Peltier  | 46 |
| Orgenkoncerto ĉe la Dominikanoj   | 47 |
| <b>Merkredon:</b> Ni pritraktis movadajn temojn kaj poste ni iris al la Kapelo de la Mirakla Medalo, al la Katolika Instituto, kie IKUE estis fondita, kaj ĉe la Martiroj de la Revolucio | 47 |
| <b>Ĵaŭdon:</b> Studrondoj kaj ĉirkaŭiro en Parizo   | 48 |
| <b>Vendredon:</b> Vizito al Nia Sinjoro de la Espero kaj al Unuiĝo Franca por Esperanto   | 49 |
| <b>Sabaton:</b> Adiaŭo  | 49 |
| <b>1910 – CENTJARIĜO DE IKUE – 2010</b>   |    |
| El la <b>historio</b> de la katolikaj esperantistoj kaj de IKUE   | 50 |
| <b>ŜLOSILO</b>  | 58 |
| (kromaj) <b>MOVADAJ INFORMOJ</b>  | 59 |

**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio**

Telefono kaj fakso: +39-06.39.63.81.29 - Elektronika poŝto: <ikue@ikue.org>

TTT-paĝoj: <http://www.ikue.org> - <http://www.esperokatolika.org> \* Dissendolisto: <ikue@yahoo.com>

UEA-konto “ikue-v” \* Banko: “Unione internazionale cattolica esperantista” Roma, Italio

IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPHITRRXXX

**Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo - Registrazione presso il Tribunale di Roma**

n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

**Presejo - Tipografia**

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

**Respondeca Direktoro - Direttore responsabile**

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio  
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de I.K.U.E.

**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Vic-Prezidanto:** Sac. Attila Szép - **Vic-Prezidantino:** Marija Belošević - **Ĝenerala Sekretario:** Carlo Sarandrea - **Kasisto, direktoro de la C.O.:** Antonio De Salvo - **Estraranoj:** Sac. Gabriel Anda, Sac. Lajos Kóbor, Bruno Masala, Stanisław Śmigielski - **Kontorevizoroj:** Giovanni Daminelli, Pavol Petrik.

## ONI SOLENIS EN PARIZO LA CENTJARIĜON DE IKUE 63-a Kongreso de IKUE 27.06.-03.07.2010

*Kongresa temo: «Neniam profetaĵo estas alportita per homa volo;  
sed homoj, movataj de Sankta Spirito, parolis laŭ Dio» (2Pet 1,21).  
La katolika E-movado 100 jarojn poste: “Ĉu ni parolis laŭ Dio?”.*

Antaŭ cent jaroj, la 1-an de aprilo 1910, estis fondita Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. La fonda kongreso, kiun partoprenis ĉ. 600 personoj kaj multaj reprezentantoj de tiamaĵ medioj kaj institucioj, okazis en la Katolika Instituto de Parizo.



*Baziliko Sacré Coeur en Montmartre.*

Ekestis do la deziro post 100 jaroj denove reveni al Parizo, por omaĝi al pioniroj de la IKUE-movado, retrorigardi la centjaran ekzistperiodon ekde ĝia fondo ĝis nuntempo, kaj ankaŭ ĉerpi novan elanon por enpaŝi la duan jarcenton de IKUE. Trovi kongreslokon, kiu konvenus al financaj eblecoj de la esperantistoj, estis malfacila tasko. Danke al frato Daniel Chevalier estis trovita klostro de benediktaninoj en tre alloga loko en Parizo en tuŝapudeco de la fama Baziliko de sankta Koro de Jesuo en urboparto Montmartre. En la unua klostra domo loĝis plejparto de la kongresanoj kaj la restanta parto loĝis en la dua tre proksima klostra domo. En la unua klostra domo ĉiuj manĝis, kongresis kaj en la sufiĉe granda kapelo okazis sanktaj mesoj kaj pluaj preĝadoj.

La kongregacio de la Benediktaninoj de

la sanktega Koro en Montmartre estis fondita en 1898 fare de Adèle Garnier, kun la celo konstante serĉi Dion en la monaĥina vivo laŭ devizo “Preĝu kaj laboru!”.



*La kongresejo - klostro de la benediktaninoj.*

Preskaŭ ĉiuj kongresanoj atingis la kongreslokon dimanĉe la 27-an de junio. Vespere okazis la sankta meso en la klostra kapelo; sekvis vespermanĝo kaj mallonga programo



*Ĉe akcepto diligente laboras Marija Beloŝević*

en la kongresejo, mallonga ĉar je la 21-a horo oni fermas la pordon kaj la loĝantoj en la 2a domo devis foriri. Tio ĉi (krom kelkaj esceptoj) iom limigis la organizadon de la vesperaj programoj kaj promenoj en la urbo, sed la avantaĝoj de la loko kompensis ĉi tiun malavantaĝon.

La inaŭgura sankta Meso okazis lunde je la 10-a horo en Kripto de la apuda Baziliko. Post ĝi okazis solena malfermo de la kongreso en klostra salono. Venis pliaj salutleteroj, inter ili de kardinalo Stanisław Ryłko, prezidanto de la papa Konsilio por Laikoj, de la direktoro de Radio Vatikana p. Federico Lombardi S.J., de la prezidanto de UEA s-ro Probal Dasgupta, de la sekretario de KELI s-ro Pavel Polnický kaj de la prezidanto de TOLE prof-ro Bojdar Leonov.



*Dimanĉa sankta meso en la klostra kapelo. Pastroj Luigi Alfano, Italio, Andreo Héroux kaj Benedikto Ente, Francio.*


### **Papa Konsilio por Laikoj**

La 27-an de junio 2010

Kara Prezidanto Šváček,

mi ĝojas adresi koran saluton al la partoprenantoj en la 63-a kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE), kiu okazas en Parizo, la sama urbo, kiu vidis ĝian naskiĝon antaŭ cent jaroj.

En la ĝoja datrevena cirkonstanco, kiun vi solenas, vi deziras pliprofundigi la centjaran



*Interno de la Baziliko de la sankta Koro en Montmartre, Parizo.*

historion de via Unuiĝo, por konstati, kiamaniere vi restis fidelaj al tio, kion, laŭ sugesto de la sankta Spirito, la Eklezio transdonas kun aŭtoritato, por alveni al la perfekta kono de Kristo.

Ne estas dubo, ke tra la jardekoj, la atestoj de saluto, bondeziro kaj beno adresitaj al la Unuiĝo de la Plejaltaj Pontifikoj kaj la tre multenombraj atestoj de Kardinaloj kaj Episkopoj de la Eklezio, kiuj laŭdas kaj kuraĝigas vian agadon, ĝuste montras, ke vi ĉiam klopodis gardi vian konstantan kaj totalan fidelecon al la Instruado de la Eklezio.

Cetere, via unua Prezidanto, inaŭgurante la fandan kongreson, tiel resumis la celojn je la bazo de la kunveno, kiu estis malfermiĝonta: “Doni ateston pri la unueco de la Sankta Eklezio en la sama fido, oboe kaj religia spirito, kaj samtempe doni ateston pri la utileco de Esperanto por katolikismo”.

Krom danki la Sinjoron pro la donaco de ĉi tiu datreveno, kaj en la preĝanta memoro

pri ĉiuj personoj, paŝtistoj kaj laikoj, kiuj kunagadis por la realigo de viaj karismoj, vi intencas per via Kongreso ankaŭ mediti pri la hodiaŭa rolo de la esperantistaj laikoj en la vivo de la Eklezio, kaj kiel via Unuiĝo povas ankaŭ en la Tria Jarmilo, en la plej bona maniero, laŭ viaj donoj, atesti pri la beleco de la vero kaj de la ĝojo esti kristanoj, por vekti la ĝojon de la fido, la amon al la Eklezio kaj la pasion por la Dia Regno, kaj ankaŭ por “kontribui al la realigo de la homaj interkompreno, frateco kaj paco en la nuntempa mondo”; strebi “por ke ĉiuj estu unu” (*Statuto IKUE, n-ro 5*).

La 2a Vatikana Koncilio memorigas al ni antaŭ ĉio, ke “la laikoj, samkiel ĉiuj fideluloj, dank’ al la bapto kaj al konfirmacio, ricevas de Dio la taskon apostoladi; pro tio ili havas la devon kaj ĝuas la rajton, unuope aŭ kuniĝinte en asociojn, engaĝi sin, por ke la Dia mesaĝo en asociojn, engaĝi sin, por ke la Dia mesaĝo pri la savo estu konata kaj akceptata de ĉiuj homoj kaj sur la tuta tero” (*kp. Dua Vatikana Koncilio, dogm. Konst. Lumen gentium, 33*).

Ĉi tiu apostola agado de la katolika laikaro en la Eklezio fariĝas pli kaj pli urĝa, se ni turnas la rigardon al la postuloj kaj al la defioj de la nuntempa vivo. La laikoj devas fariĝi mem misiistoj de Kristo ĉe siaj gefratoj en la diversaj lokoj de vivo, laboro, studo.

Via Unuiĝo havas la apartaĵon, ke ĝi agadas en la multobleco de landoj, tradicioj, kulturoj, en kiuj vivas la sekvantoj de la lingvo Esperanto, el kiuj multegaj estas disponaj ekaŭskulti la kristanan mesaĝon nur pro la komuna uzata lingvo. Pro tio fariĝas eĉ pli nepra tio, kion vi deziras realigi avantaĝe al la evangelizado, ĉar la devo anonci Kriston estas eĉ pli premanta en la kazoj, en kiuj nur pere de laikoj la homaro povas aŭskulti la Evangelion kaj koni Kriston (*kp. Lumen Gentium, samloke*).

Preĝpetante la riĉecon de la donacoj kaj de la karismoj, kiujn la Sinjoro oferedonas al ni, por ke la tagoj, kiujn vi travivos kune estu vivanta fermentilo por daŭre esti lumaj atestantoj pri la Resurekto, mi salutas vin ĉiujn kaj vin benas kore.

Stanisław kard. Ryłko, *prezidanto*

### *Bonvenigo kaj saluto de la Prezidanto de IKUE s-ro Miloslav Švábek*

Tre estimataj kaj karaj gefratoj, gekongresanoj!

Post longa 85-jara tempoperiodo la katolikaj esperantistoj denove kolektiĝis en Parizo, por kune travivi la kongresan semajnon de la 63-a Kongreso de Internacia Katolika



*Solena malfermo - alparolo de Carlo Sarandrea, ĝenerala sekretario de IKUE.*

Unuiĝo Esperantista. La lasta kongreso, la 10-a de IKUE, okazis en Parizo en 1925. Sed tiu kongreso ne revenigis nin ĉi tien, sed ni venis al Parizo pro pli grava evento – por soleni la Centjariĝon de IKUE, kiu la 1-an de aprilo 1910, do antaŭ cent jaroj, estis fondita ĝuste en la franca ĉefurbo Parizo. Nu, tiu ĉi grava jubileo de IKUE estas la kaŭzo ne nur por ĝoji, sed precipe por danki al Dio por la centjara ekzistado de IKUE, kaj por kune elpeti Diajn benojn por la enpaŝo de IKUE en sian duan jarcenton. Dum la kongresa semajno ni kun dankemo en la koro rememoru tiujn, kiuj, spite de diversaj, ne ĉiam facilaj historiaj eventoj, sukcesis la torĉon kaj la standardon de IKUE ĝisporti dum la pasintaj cent jaroj ĝis la hodiaŭa tempo. Precipe ni rememoru du gravajn personulojn de la IKUE-movado: la unua staris ĉe ĝia naskiĝo – pastro Emile Peltier; la dua enskribiĝis per oraj literoj en la fina tempo de la jubileo – pastro Duilio Magnani. Ni do danku al Dio por ili kaj la ceteraj pluaj personuloj, oferemaj kaj sindonaj al la idealoj de IKUE, dum la forpasinta centjara periodo, sed ni ankaŭ humile petu, ke Dio konservu la unuiĝon de IKUE ankaŭ en la

plua jarcento kaj ĝin abunde benu, por ke ĝi ne nur plu ekzistu, sed ankaŭ firme kaj fidele staru sur la ĝustaj fundamentoj de la Katolika Eklezio.

Karegaj gefratoj, elkore mi deziras al ni ĉiuj travivon de la 63-a Kongreso de IKUE de la grava IKUE-jubileo en amikeca, familia kaj vere kristana medio; ĉerpon de novaj kuraĝo kaj forto por plu porti la levitan standardon de IKUE en la dua jarcento. Dio do benu nin kaj la kongreson kaj la Virgolino Maria - Nia Espero – ĉiam akompanu nin patrinece kaj subtenadu nin en la espero, ke ni iras la ĝustan vojon plenumante la kristanajn idealojn kaj la idealojn de la esperantistoj!”.



Šváček el Ĉeĥio. Prezentisto de la programo estis Carlo Sarandrea el Italio. Temo de la Ronda Tablo estis: “Kion signifas esti katolika esperantisto”. Unue ĉiuj el la kvar invitetitoj prezentis sian prelegeton pri la koncerna temo kaj poste sekvis interesa diskutado, en kiu partoprenis ankaŭ la ceteraj ĉeestantoj.



*La kongresanoj en la preĝejo de sankta Petro.*

La vesperaj preĝoj okazis en la apuda preĝejo de sankta Petro, en kiu bonvenigis la kongresanojn la paroĥestro, kiu konigis koncize la historion de tiu ĉi malnova apudbazilika preĝejo.

Posttagmeze okazis en la kongresejo Ronda Tablo, al kiu estis invititaj sac. Pierluigi Svaldi el Italio, D-ro Ulrich Matthias el Germanio, Bruno Masala el Francio kaj Miloslav



*La alparolon de la paroĥestro de la preĝejo de sankta Petro tradukas Bruno Masala.*



*Pri P. Peltier prelegas Dominique Baron.*

La marda matena prelego estis dediĉita al la ĉefa fondinto de IKUE pastro Emile Peltier (\*20.09.1870 en Villandry apud Tours, Francio, †17.02.1909 en Lourdes). Prelegis la

franca esperantisto Dominique Baron, kiu el diversaj arkivaj dokumentoj kolektis gravajn informojn pri tiu ĉi pioniro de la katolika E-movado. Poste sekvis la sankta Meso en la klostra kapelo.

Posttagmeze okazis komuna promonado tra kvartalo Montmartre kaj poste oni atingis la dominikanan preĝejon, en kiu okazis belega orgenkoncerto fare de la germana kongresano frato Stefan Lepping, kiu dum la kongresaj sanktaj Mesoj kaj ankaŭ ekster ili per orgeno aŭ gitaro akompanis la kantadojn de la kongresanoj.

La merkreda antaŭtagmezo estis dediĉita al la ĝenerala kunsido de IKUE. Krom prezento de la apartaj raportoj, estis precipe pritraktita la urĝa neceso aktualigi la Statuton de IKUE. Ankaŭ estis prezentita la propono okazigi la postan kongreson de IKUE en Kroatio. Ĉar venontjare la fratina organizaĵo KELI solenos sian centjariĝon, ne okazos ekumena kongreso, sed du apartaj kongresoj.



La merkreda posttagmezo estis speciale grava. Okazis la vizito al la Kapelo de la Mirakla Medalo en strato Rue du Bac, kie troviĝas la kopro de sankta Katarina

Labouré (2.5.1806-31.12.1876), al kiu dum revelacio la Dipatrino transdonis la peton pretigi la medalon. Al la personoj, kiuj ĝin portos, estis promesita ricevo de grandaj ĉielaj gracoj. Tial ĝi nomiĝas Mirakla Medalo.

En la kapelo estis celebrita la sankta Meso por la kongresanoj. Ĉefcelebranto estis la juna franca pastro Benedikto Ente. Kuncelbris pastroj Luigi Alfano, Andreo Heroux, Pierluigi Svaldi kaj Stanislaw Platek. Orgenludis frato Stefan Lepping.

Post tiu ĉi neforgesebla vizito de la kapelo de Mirakla Medalo okazis ankaŭ historie tre grava vizito al la Katolika Instituto en Parizo, kie la 1-an de aprilo 1910 estis fondita IKUE. En la Katolika Instituto oni povis vidi, kie antaŭ cent jaroj 600 katolikaj esperantistoj kongresis kaj fondis IKUE'n. Specialan emocion oni povis tie senti konsciiĝante,



*Mescelebro en la Kapelo de la Mirakla Medalo. De maldekstre sac.: Luigi Alfano, Andreo Héroux, Benedikto Ente, Pierluigi Svaldi, Stanislaw Platek.*

kiel grava loko por IKUE ĝi estas kaj kiom da katolikaj esperantistoj ekde tiam estis fervorantaj por la IKUE-celoj.

Apud la Katolika Instituto estas la preĝejo de sankta Jozefo de la Karmelanoj. En ĝi en



*En la Katolika Instituto en Parizo estis fondita en 1910 IKUE.*

1792 dum la Franca Revolucio estis arestitaj kaj murditaj 192 pastroj el la proksima teritorio. La ĉiĉeroninoj ne nur detale informis pri tiu terura evento el la malĝoja historio de Francio, kies fruktoj kaŭzas ĝis nun ne nur en

Francio, sed en la tuta Eŭropa Unio grandajn damaĝojn, sed ankaŭ, ili montris al la kongresanoj lokojn, kie la pastroj – martiroj estis turmentitaj kaj fine ekzekutitaj.

La jaŭda antaŭtagmezo estis disponigita al tri studrondoj kaj debato sub gvido de fratino Marija Beloŝević. En la studrondoj oni diskutis pri tri temoj:

1.) Kie ni estas: a) en la Eklezio (nia kontribuo al la ĝenerala Eklezio, rilatoj kun aliaj



*Unu el tri studrondoj dumlabore.*

ekleziaj movadoj); b) en la E-movado.

2.) Kien nin puŝas la sankta Spirito: a) al la partopreno kaj servo de la Eklezio, kion la Eklezio atendas de ni; b) al la mondo kaj movado.

3.) Kien ni deziras iri: a) al evangelizado per Esperanto; b) karitata agado; c) ekumenismo.

Temo de la debato estis: “Rolo de sacerdotoj kaj laikaj asocioj, komunumoj”.

Post tiu ĉi programero okazis komuna sankta Meso en la klostra kapelo kun la monaĥinoj.

En la jaŭda posttagmezo dank’ al tri gvidantoj Anne-Marie, Daniel kaj Louis, la grupoj povis viziti la ĉefajn vidindaĵojn de Parizo. La plej grava el ili estis kompreneble la Katedralo Notre Dame, sed ankaŭ la vizito al ceteraj gravaj memorindaĵoj restos por longa tempo en la memoro.

Ankaŭ dum la vendreda antaŭtagmezo oni povis ĝui vidindaĵojn de Parizo. En la kongresa semajno do estis disponigita sufiĉa spaco por vizito de almenaŭ la plej gravaj memorindaĵoj de la kongresa urbo.

La vendreda posttagmezo estis libera. Laŭdezire oni povis partopreni grupajn vizitojn de la parizaj vidindaĵoj. El ili la plej grava estis vizito de preĝejo de Nia Sinjorino



*Dumekskursa ripozo en la parko.*

de la Espero ligita kun la IKUE-movado. La Virgulino Maria - Nia Sinjorino de la Espero estis en 1913 elektita kiel ĉiela patronino de IKUE. Post Ŝi sekvis papo sankta Pio la 10-a, sankta Maksimiliano Maria Kolbe kaj beata Tito Brandsma (esperantisto, ankaŭ martiro de naziismo, kiel sankta Kolbe).



*La moderna preĝejo de Nia Sinjorino de la Espero.*





*En la preĝejo de Nia Sinjorino de la Espero, antaŭ la samnoma statuo.*

Fine oni vizitis la sidejon de Unuiĝo Franca por Esperanto, kie oni povis iom refreŝigi sin per trinkaĵoj tiucele preparitaj, ĉar dum la tuta kongresa semajno regis varma suna vetero.

Vespere povis okazi bedaŭrinde nur mallonga (pro la horo de pordŝloslo) adiaŭa vespera programo. Tamen la vespera tempo estis bone eluzita por unuhora komuna adorado de Jesuo en la Eŭkaristio kune kun la fratulinaj en la klostra kapelo.

Nu, sabato estis la adiaŭa kongresa tago. Okazis la fermo de la kongreso, kune kun la fratulinaj, per danko sankta Meso en la klos-



*En la sidejo de Unuiĝo Franca por E-o.*

tra kapelo; sekvis tagmanĝo kaj adiaŭo al la gastiganta klostro de benediktaninoj, al la impona Baziliko de Sankta Koro de Jesuo kaj al Parizo - la ĉefurbo de Francio.

Dankon al Dio pro la okazinta 63-a Kongreso de IKUE en Parizo en la centjariĝo de ĝia fondo. Dankon al fratinoj Marija Beloŝević kaj Flory Witdoeck kaj fratoj Daniel Chevalier kaj Bruno Masala, pro la preparo de la kongreso kaj laborado por ĝia sukcesa okazigo. Dankon al fratulinaj benediktaninoj por ilia gastigado de la kongreso. Dankon al ĉiuj, kiuj iamaniere kunlaboris kaj volonte helpis dumkongrese. Dio benu ĉiujn!

*Miloslav Šváček*



## 1910 – CENTJARIĜO DE IKUE – 2010

*Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) solenis sian centjariĝon per jubilea Kongreso okazinta de la 27-a de junio ĝis la 3-a de julio en Parizo, en la urbo, kie ĝi estis fondita. La dia Providenco aranĝis, ke IKUE - kiel neniu alia E-asocio - povis reveni al sia naskiĝloko 100 jarojn poste. Sekvis post 1910 jardekoj da historio. Nur Dio konas ĉiujn nomojn de la gefratoj, kiuj portis IKUE'n ĝis la 3an jarmilon. Sed ni klopodu omaĝi al kelkaj el ili, laŭ la historiaj dokumentoj, kiuj postrestis. Tiucele ni publikigas tekston el la libro de D-ro Ulrich Matthias el Germanio "Esperanto – La nova Latino de la Eklezio".*

### El la historio de la katolikaj esperantistoj kaj de IKUE

La historio de la kristana Esperanto-movado estas preskaŭ same aĝa kiel la lingvo mem. Jam malmultajn monatojn post la apero de la unua lernolibro kelkaj katolikaj sacerdotoj interesiĝis pri la nova lingvo, i.a. episkopo Zerr en Saratov.

La unuaj ege aktivaj katolikaj esperantistoj estis la litovo Aleksandras Dambrauskas (1860-1938) kaj la franco Franzose Louis de Beaufront (1855-1935). Dambrauskas eksciis jam en 1887 kiel studento en la pastra akademio de Sankt-Peterburgo pri la apero de Esperanto. Li mendis ĉe Zamenhof la "Unuan Libron" kaj entuziasme komencis lerni la novan lingvon. Jam post unu semajno li skribis al Zamenhof sian unuan poŝtkarton en senerara Esperanto. Dambrauskas verkis la unuan lernolibron de Esperanto por litovoj. Ĝi aperis en 1890 en Tilsit (Germanio), de kie oni kontra-bandis ĝin al Litovio, ĉar ĝis 1904 la cara registaro malpermesis al la litovoj eldoni verkojn en sia gepatra lingvo. Eĉ Zamenhof, vivanta en la tiutempe rusa urbo Varsovio (respektive de 1893-1897 en Grodno) aŭdacis nur kaŝe oferti la libron al vendado. "Pro kialoj, kiujn vi kredeble scias (niaj leĝoj ne permesas litovajn librojn kun latinaj literoj) la libro devas figuri en la 'Nomaro de verkoj' kiel 'Nericevebla'", li skribis al Dambrauskas en 1896.



*Aleksandras Dambrauskas*

Jam en 1893 Dambrauskas komencis verki originalajn poemojn en Esperanto. Oni nomas lin "la poeto de la katolika Esperanto-movado". Lia "Versaĵareto" (1905) estas verŝajne la unua poemaro de individua poeto en Esperanto. Li verkis ankaŭ du matematikajn libretojn kaj filozofian libron "Malgrandaj pensoj pri grandaj demandoj". Dum duona jarcento, ĝis sia morto en 1938, li restis fidela al Esperanto.

Louis de Beaufront estis la unua franca esperantisto. Li lernis la lingvon en 1888 kaj tuj komencis vigle propagandi ĝin. En 1892 li eldonis lernolibron de Esperanto por francoj; sekvis diversaj ekzercaroj, vortaroj, gramatikoj kaj informbroŝuroj. De Beaufront, kies vera nomo estis Louis Chevreux, studis lingvistikon, filozofion kaj teologion; li estis doktoro pri teologio kaj vivtenis sin i.a. kiel privata instruisto. En 1893 li verkis libreton kun la titolo "Preĝareto por katolikoj". Ekde 1898 li eldonis la franclingvan gazeton "L'Espérantiste", kiu aperis de la sekva jaro kun esperantlingva aldono. En tiu ĉi gazeto de Beaufront ĉiam volonte disponigis spacon al la artikoloj de katolikaj esperantistoj. En 1908 de Beaufront forlasis la Esperanto-movadon kaj dediĉis sian energion al Ido, kiun li inventis komune kun Couturat.

Per sobraj argumentoj Louis de Beaufront sukcesis interesigi multajn francojn pri Esperanto. Unu el ili estis Emile Peltier, pastro de paroĥo Sainte-Radegonde apud

Tours. En 1901 Peltier komencis lerni Esperanton, kaj jam la postan jaron alia franca esperantisto, Henri Auroux, proponis al li fondi katolikan esperantistan organizon. Peltier akceptis la instigon. Kune kun Auroux li pretigis statuton kaj komencis varbadon. La ĉefepiskopo de Tours, René François, donis sian permeson fondi asocion:

“Vi postulis mian juĝon pri entrepreno, kiu celas unuigi la ĉiunaciajn katolikojn per la internacia helpa lingvo, nomata Esperanto. Mi tre volonte aprobas tiun projekton, kiu al mi ŝajnas favori la disvastigadon de l’ Evangelio kaj la pliuuniĝon de la popoloj.”



*Pastro Emile Peltier.*

Sekve en decembro 1902 estis fondita la societo Espero Katolika. Peltier kaj Auroux sukcesis varbi ĉirkaŭ 80 membrojn, sed krom ili neniu pretis transpreni iun taskon. Pro tio fiaskis ilia provo registri la asocion laŭ franca leĝo. En 1903 Peltier kaj Auroux decidis provizore rezigni pri la Societo por fondi revuon, kiu servu kiel “internacia ligilo inter la katolikoj”. Ĝia unua eldono aperis en oktobro 1903, same sub la nomo Espero Katolika. Auroux transprenis la redaktadon de la revuo, dum Peltier fariĝis ĝia direktoro, zorgante pri administrado kaj varbado. Sed jam kvar monatojn poste, en februaro 1904, Auroux retiriĝis kiel redaktoro, eble ĉar lia inklino al “lingvaj praktikoj ne tute korektaj” provokis multe da kritiko.

De tiam ĉiuj taskoj pezis sur Peltier – la redaktado de la revuo same kiel la administrado de la abonoj kaj la informado. Kaj konstante Peltier devis plenumi ankaŭ siajn taskojn kiel pastro. Aldoniĝis financaj problemoj, ĉar la enspezoj el la 300 abonoj en 1904 ne sufiĉis por kovri la kostojn de kompostado, presado kaj ekspedo. Kaj aldone sanproblemoj suferigis lin.

Sed optimisme Peltier plu laboris por siaj idealoj. Novajn impulsojn donis al li la unua Unversala Kongreso en 1905. La penso pri frateco ne nur inter diversnacionoj, sed ankaŭ inter diversreligianoj lin kaptis kaj kuraĝigis al ekumena agado.

La jaro 1906 fariĝis ankaŭ la jaro de la unua papa beno por la katolika Esperanto-movado. En privata aŭdienco la 2-an de junio de tiu jaro Luigi Giambene, esperantista pastro el Romo, transdonis al Papo Pio la 10-a la unuajn jarkolektojn de Espero Katolika kaj la “Preĝareton por Katolikoj” de Louis de Beaufront. Iom poste li ricevis el Vatikano la sekvan itallingvan leteron de la 27-a de junio, subskribitan de Monsinjoro Giovanni Bressan:

“Mi ricevis la honoran komision sciigi al vi, ke la Sankta Patro favoranime kaj kun speciala plaĉo bonvolis akcepti la aperintajn numerojn de l’ Revuo Espero Katolika, kiun vi humile prezentis al Li je la nomo de l’ Pastro Emilo Peltier. Bonvolu Via tre respektinda Monsinjora Moŝto konigi al la nomita pastro la



*La kovrilo de la unuaj jarkolektoj de EK prezentitaj al Pio la 10-a.*

Papan plaĉon kaj komuniki la Apostolan Benon, kiun Lia Sankta Moŝto donis al li kaj al la redaktoroj de l' Revuo”.

De la 28-a de aŭgusto ĝis la 2-a de septembro 1906 okazis en Ĝenevo la 2-a Universala Kongreso de Esperanto.



*Mons. Luigi Giambene.*

La hispana pastro Antonio Guinard celebris tie Sanktan Meson en Esperanto, dum kiu Peltier supreniris kun videbla emocio al la predikejo por prediki – kun permeso de la ĝenerala vikario de Ĝenevo – en Esperanto.

Sed tiu estis la lasta Universala Kongreso, kiun Peltier povis partopreni. Lia malsano pli kaj pli turmentis lin, kaj la revuo Espero Katolika aperis ofte nur kun granda malfruo. Sed ĝi aperis. “La moralaj kaj spiritaj fortoj – domaĝe ne la korpaj – estis simple enormaj”, skribis

Nico Hoen en sia Historio de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, “kaj estis nur tiuj fortoj, ĉerpitaj el plej profunda fido en Dio, kiuj subtenis la senmezure admirindan eltenon kaj kuraĝon de Peltier”.

Nur kiam ekde aŭgusto 1908 la revuo ne plu aperis, troviĝis homoj pretaj transpreni la laboron de Peltier. La 24-jara Claudius Colas fariĝis nova ĉefredaktoro,



*1-a IKUE-prezidanto P. Austin Richardson, Belgio  
01.04.1910 - 21.08.1913*

kaj la angla abato Austin Richardson transprenis la administradon. Komence de 1909 Espero Katolika reaperis, kun artikolo de Peltier, kiu tiamaniere malobeis la ordonojn de lia kuracisto pri plena ripozo. Mallonge poste Peltier pilgrimis al Lourdes kaj petis al Maria “aŭ resanigi lin aŭ doni al li la gracon morti ĉe la sanktejo”. Estis tiu lasta graco, kiu estis donita al li. Peltier mortis 38-jara la 17-an de februaro 1909 en Lourdes. “Li enmetis sian karan revuon en niajn manojn, kiel patrino mortonta komisias

en manojn amikajn sian amatan infanon”, skribis Claudius Colas en Espero Katolika de marto 1909.

Tom pli ol unu jaron post la morto de Peltier, en aprilo 1910, en Parizo okazis la unua Katolika Esperanto-Kongreso. Kadre de tiu kongreso estis fondita Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE). En la sekvaj jaroj la nova asocio bone evoluis. Ĉiujare okazis pliaj kongresoj de IKUE: en 1911 en Den Haag, en 1912 en Budapeŝto kaj en 1913 en Romo. La revuo Espero Katolika regule




*2-a IKUE-prezidanto  
P. Patrick Parker, Irlando  
07.09.1913 - 16.08.1920*



*3-a IKUE-prezidanto  
P. Lambert J. J. M. Poell  
Gemert, Nederlando  
16.08.1920 - ?*



*4-a IKUE-prezidanto  
s-ro Paulus Antonius  
Schendeler, Nederlando  
1921 - 1924*



*5-a IKUE-prezidanto  
P. Francisko de Paul  
Meŝtan, Aŭstrio  
1922 - 05.08.1927*



*6-a IKUE-prezidanto  
P. Juan Font y Giralt,  
Hispanio  
05.08.1927 - 08.08.1935*

Ekde 1920 la gazeto *Espero Katolika* reaperis. Sekvis jaroj, en kiuj fondiĝis pliaj kristanaj esperantistaj revuoj kaj asocioj. Specialan men-

aperadis ĉiumonate.

En aŭgusto 1914 devis okazi en Lourdes la 5-a IKUE-Kongreso. La preparoj evoluis laŭplane; en *Espero Katolika* de julio/aŭgusto 1914 la prezidanto de IKUE, la irlanda pastro Patrick Parker, “kun granda plezuro” anoncis la papan benon por la kongreso. Sed subite eksplodis la unua mondmilito. La kongreso ne okazis; la ĉeforganizanto Claudius Colas estis vokita al milita servo kaj mortis malmultajn semajnojn poste, la 11-an de septembro, 29-jara en la batalo ĉe rivero Marno.

*Espero Katolika* dum la unua mondmilito ne plu aperis, kaj ankaŭ la ceteraj agadoj de katolikaj esperantistoj interrompiĝis.

Dum la unua mondmilito la aplikado de Esperanto renkontis multajn malhelpojn. Jen oni malpermesis korespondadon en Esperanto pro manko de cenzuristoj por tiu lingvo, jen oni malpermesis la eniron de Esperanta revuo pro “malfavora influo sur la batalantoj ĉe la fronto”. Preskaŭ ĉie la nombro de Esperantaj kursoj kaj renkontiĝoj konsiderinde malkreskis. Nur 163 homoj, plejparte el Usono kaj Kanado, partoprenis en 1915 la 11-an Universalan Kongreson de Esperanto en San Francisko. En la neŭtrala ŝtato Svisio la oficejo de Uniuersala Esperanto-Asocio en Genevo organizis servon por transendo de familiaj korespondaĵoj inter malamikaj landoj. La “iniciatoro” de Esperanto, Ludoviko Zamenhof, mortis la 17-an de aprilo 1917 en Varsovio pro kormalsano.

En 1917 katolikaj pacifistoj fondis la “Mondpacligon Blanka Kruco”, kiu uzis ekde 1918 Esperanton en siaj internaciaj kontaktoj.



*7-a IKUE-prezidantino  
F-ino Marie Laroche,  
Francio  
18.08.1934-8.08.1935*



*8-a IKUE-prezidanto  
s-ro Petrus Heilker,  
Nederlando  
08.08.1935 - 15.08.1950*

cion meritas “Internacio Katolika” (IKA), kies fondon iniciatis la pastro kaj martiro Max Josef Metzger (1887-1944), kiu poste famiĝis kiel pacifisto kaj “pioniro de ekumenismo”. Kvankam fondita en 1920 kadre de la Universala Kongreso de Esperanto en Den Haag, IKA intence



*9-a IKUE-prezidanto  
P. Alfons Beckers, Belgio  
15.08.1950 - 23.07.1966*

evitis la vorton “Esperanto” en sia nomo. La asocio turnis sin ankaŭ al tiuj katolikoj, kiuj ne parolis Esperanton kaj eventuale eĉ ne deziris mem lerni ĝin. De 1921 ĝis 1924 Metzger redaktis en Graz (Aŭstrio) la esperantlingvan gazeton “Katolika Mondo”.

Dum en la 20-aj jaroj de la 20-a jarcento la sukcesoj kaj elreviĝoj ankoraŭ alternis; la 30-aj jaroj estis tempo de malsukcesoj kaj katastrofoj. En 1931 la kataluna pastro Juan Font Giral el Collell apud Gerona elektiĝis prezidanto de IKUE; ekde la sekva jaro li transprenis ankaŭ la redaktadon de Espero Katolika. Fine de 1934 Font Giral malsaniĝis, tiel ke Espero Katolika fine estis redaktita de nederlandaj IKUE-aktivuloj. En 1936 Font Giral fartis denove pli bone – sed tiam komenciĝis la hispana civitana milito, en kiu dekmilo da kristanoj mortis pro sia religio. Ankaŭ Font Giral estis terure martirigita; la 17-an de aŭgusto oni forhakis liajn manojn kaj bruligis lian korpon.


En 30-aj jaroj precipe en Nederlando Esperanto prosperis, de kio certa-  
grade profitis ankaŭ IKUE. Pli malfacila estis la situacio en Germanio, kie komence de 1933 Adolf Hitler akiris la potencon. La 20-an de junio 1936, dekreto de Heinrich Himmler, la ĉefo de la sekreta ŝtata polico “Gestapo”, ordonis al la esperantaj asocioj en Germanio mem likvidi sin, se ili volas eviti devigan dissolvon. Ekde tiam ankaŭ ĉia agado por IKUE estis malpermesita en Germanio.



*10-a IKUE-prezidanto  
s-ro Jacques Tuinder,  
Nederlando  
23.07.1966 - 04.02.1971*

Fine de la 30-aj jaroj Espero Katolika estis redaktita en Nederlando. Post kiam komenciĝis la dua mondmilito, la gazeto ne plu povis atingi grandan parton de la abonantaro. Espero Katolika de januaro/februaro 1940 estis la lasta numero ĝis la fino de la milito. En la landoj regataj de Hitler kaj Stalin ankaŭ esperantistoj fariĝis viktimoj de tiuj diktatoroj.

Post la fino de la milito IKUE povis sufiĉe rapide restariĝi en la okcidentaj landoj. Ekde 1946 la gazeto Espero Katolika denove aperis. Post interrompo de 11 jaroj



*11-a IKUE-prezidanto  
P. Ferdinando Longoni,  
Italio  
04.02.1971 - 24.10.1975*



*12-a IKUE-prezidanto  
P. Czesław Biedulski,  
Pollando  
02.1976 - 06.02.1979*

en 1950 la katolikaj esperantistoj denove organizis sian kongreson. Estis la 22-a IKUE-Kongreso, kaj samtempe (post tiuj de 1913 kaj 1935) la tria, kiu okazis en Romo.

Tre malfacila restis la situacio en orienta Eŭropo, kie sub influo de Stalin stariĝis komunismaj reĝimoj, kiuj malŝatis kaj Esperanton kaj kristanismon kaj do havis duoblan kialon por malhelpi la agadon de IKUE. Dum la tempo de la “malvarma milito” kontaktoj al okcidentaj landoj, kie IKUE havis sian sidejon, ne estis tolerataj, kaj la registaroj de la satelitaj ŝtatoj de Sovetunio deziris direkti la intereson de la civitanoj al la “vera mondolingvo”, t.e. la rusa.

Iom pli favora estis la situacio en Pollando, kie la registaro en 1957 permesis almenaŭ la eniron de Espero Katolika (kvankam restis malfacilaĵoj rilate la pagon de la abonkotizo). Sed iu pli proksima kunlaboro de esperantistoj el oriento kaj okcidento dum longa tempo ne eblis, kaj do ne estas mirige, ke en la 50-aj kaj 60-aj jaroj ĉiuj kongresoj de IKUE okazis en okcidentaj landoj.



*14-a IKUE-prezidanto  
D-ro Antonio De Salvo,  
Italio  
12.07.1995 - 04.09.2003*

Post kiam la Dua Vatikana Koncilio (1962-1965) de la Katolika Eklezio emfazis sian pretecon al ekumena kunlaboro, IKUE akceptis en julio 1966 la inviton de KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia) organizi la unuan komunan kongreson de la du asocioj. Ĝi okazis en 1968 en Limburg (Germanio) kaj estis samtempe la 32-a Kongreso de IKUE kaj la 21-a de KELI.

En la sama jaro la “Praga Printempo” kuraĝigis la ĉefajn IKUE-membrojn kaj KELI-anojn inviti al ekumena Esperanto-kongreso en sia lando. Ĝi devis okazi en somero 1970 en Brno. Sed post la invado de la sovetia armeo baldaŭ komenciĝis “normaliga proceso”, kaj la ministerioj de kulturo kaj internaj aferoj malpermesis la okazigon de la kongreso ses semajnojn antaŭ ĝia planita komenco. La kongreso translokiĝis al Klagenfurt, sed nur malmultaj el la aliĝintoj el orienta Eŭropo sukcesis ĝustatempe akiri la necesan aŭstrian vizon.

Restis ankoraŭ alia aranĝo de ĉefaj IKUE-anoj, la Katolikaj Esperanto-Tendaroj fonditaj en 1969. Ili oficiale nomiĝis “Libertempaj Esperanto-Tendaroj”, por iom kaŝi la religian karakteron. Ankoraŭ dum kelka tempo ĉiusomere junaj katolikoj el Ĉeĥoslovakio kaj kelkaj aliaj landoj kiel Pollando, Hungario, Nederlando kaj Italio frate renkontiĝadis tie – ĝis julio 1977, kiam la polico invadis la tendaron kaj estis kondamnitaj la organizantoj Miloslav Šváček kaj pastro Vojtěch Srna. Mallonge poste la Ĉeĥa IKUE-Sekcio estis likvidita.

Pli ĝojiga estis denove la situacio en Pollando, kie en la sama somero okazis la 37-a IKUE-Kongreso. Estis la unua tiuspeca kongreso en socialisma lando, kaj samtempe



*13-a IKUE-prezidanto  
P. Duilio Magnani, Italio  
06.02.1979 - 12.07.1995*



*15-a IKUE-prezidanto  
s-ro Miloslav Šváček,  
Ĉeĥio, 04.09.2003 -*



*Nia Sinjorino de la Espero - Protektantino de la esperantistoj.  
Pentris P. Arcangelo Intreccialagli*



*Sankta Pio la Deka  
protektanto de IKUE  
02.06.1835 - 20.08.1914*

kun pli ol 700 partoprenantoj la ĝis nun plej granda IKUE-kongreso. Ankoraŭ dufoje, en 1978 en Varna kaj en 1987 en Częstochowa, renkontiĝis antaŭ la falo de la fera kurteno katolikoj el oriento kaj okcidento en IKUE-kongreso en socialisma lando.

La pereco de la totalismaj sistemoj donis al la kristanaj esperantistoj en orienta Eŭropo la liberecon, pri kiu ili tiel longe sopiris. La 19-an de majo 1990, preskaŭ 13 jaroj post la malpermeso, la Ĉeĥa IKUE-Sekcio refondiĝis kaj tuj fariĝis – daŭre sub gvido de Miloslav Šváček – unu el la plej aktivaj landaj sekcioj de IKUE. Ankaŭ en Rumanio kaj Litovio denove fondiĝis viglaj sekcioj de IKUE.

La Ĉeĥa Sekcio de IKUE en la jaro 1991 rekomencis organizi sub gvido de la sekcia prezidanto Miloslav Šváček ĉiujare internacian IKUE-tendaron en Sebranice apud Litomyšl (Ĉeĥio). Ĝis la jaro 2005 okazis tie 14 tendaroj. Sepfoje la tendaron vizitis la episkopo de Hradec Králové Mons. Karel Otčenášek, dufoje episkopo Josef Hrdlička el Olomouc kaj trifoje episkopo Josef Kajnek el Hradec Králové por celebri en la tendaro esperantlingve la sanktajn mesojn.

Nuntempe la organizon IKUE karakterizas kontinueco kaj stabileco. La prezidantan oficon en IKUE plenumis de 1979 ĝis 1995 la itala pastro Diulio Magnani el Rimini, ĝis kiam li transdonis la postenon al D-ro Antonio de Salvo. En 1995 okazis la 48-a IKUE-Kongreso en Olomouc (Ĉeĥio). Kaj same en 1995 IKUE sukcesis aĉeti propran sidejon en Romo, kiu nun funkcias kiel oficejo de la asocio kaj redaktejo de Espero Katolika.

La 10-an de aŭgusto 1996 junaj katolikoj el Belgio, Ĉeĥio, Germanio, Hungario kaj Slovakio fondis kadre de la



*Sankta Maksimiliano Maria Kolbe  
protektanto de IKUE  
08.01.1894 - 14.08.1941*



*Beata Titus Brandsma  
protektanto de IKUE  
23.02.1881 - 26.06.1942*





*Papo Benedikto la 15-a*  
21.11.1854 - 22.01.1922

15-a Katolika Esperanto-Tendaro en Sebranice junularan organizon de IKUE sub la nomo "IKUE-Junularo", mal-longe "IKUEJ". La anoj de la asocio ne nur ofte renkontiĝas kadre de Katolikaj Esperanto-Tendaroj, IKUE-kongresoj kaj aliaj kristanaj aranĝoj, sed tenas ankaŭ viglajn leterajn kaj retroŝtajn kontaktojn.

Ankaŭ ekleziaj altranguloj favoris la IKUE-movadon. Jam en 1931 la germana "Leksikono pri teologio kaj Eklezio" finis sian artikolon pri Esperanto per la vortoj: "La papoj ekde Pio la 10-a (kaj multnombraj kardinaloj kaj episkopoj) bonvenigis kaj subtenis la Esperantan movadon". Kaj efektive en la 20-a jarcento ĉiuj papoj montris ian favoron al la



agado de katolikaj esperantistoj. Komence de la 30-aj jaroj de la 20-a jarcento sur la titolpaĝoj de Espero Katolika aperadis la noto: "Honorita per apostola beno de Papo Pio X-a, 27-a de junio 1906, kaj de Papo Benedikto XV-a, 20-a de aŭgusto 1920, kaj de papo Pio XI-a, 11-a de oktobro 1924." Tiuj ĉi kaj aliaj benoj estas dokumentitaj ankaŭ pere de la tiutempaj numeroj de Espero Katolika.


*Papo Pio la 10-a*  
31.05.1857 - 10.02.1939



*Papo Paŭlo la 6-a*  
26.09.1897 - 06.08.1978

Papo Pio la 10-a sendis sian benon al Espero Katolika kaj al la katolikaj esperantistoj ĉiujare de 1906 ĝis sia morto en 1914. Krome en kelkaj aŭdiencoj li parolis pri Esperanto. La 4-an de aprilo 1909 li diris al Isidoro Clé, esperantista direktoro de eklezia instituto en Bruselo: "Esperanto havas antaŭ si grandan estontecon".

La 19-an de majo 1964 Papo Paŭlo la 6-a ricevis aŭdiencen parton de la IKUE-estraro kaj montris viglan interesiĝon je la katolika Esperanto-movado. Ankaŭ la eldiro kaj saluto de papo Paŭlo la 6-a pri Esperanto en 1975 estas dokumentita de la vatikana gazeto "L'Osservatore Romano".



*Papo Johano Paŭlo la 2-a*  
18.05.1920 - 02.04.2005

En la jaro 1977 okazis la 37-a IKUE-Kongreso en Ĉenstoĥovo, Pollando. Alta protektanto estis Karol Wojtyła, la posta Papo Johano Paŭlo la 2-a. Kiel unua papo li publike parolis Esperanton. Tio okazis dum la 6-a Monda Tago de la Junularo en Ĉenstoĥovo, kie la 14-an de aŭgusto 1991 li adresis dufoje siajn salutojn al pli ol unu miliono da junaj ĉeestantoj. En somero 1993 li donis apostolan benon al la Universala Kongreso de Esperanto en Valencio.

La 3-an de aprilo 1994 Papo Johano Paŭlo la 2-a unuafoje parolis sian paskan saluton antaŭ la beno "Urbi et orbi" ankaŭ en Esperanto, dezirante "Feliĉan Paskon en Kristo resurektinta". En la sama jaro sekvis la kristnaska bondeziro "Dibenitan Kristnaskon kaj prosperan novja-

ron”. Ekde tiam la Sankta Patro ĉiujare ripetadis tiujn ĉi salutojn. La nuna Sankta Patro Benedikto la 16-a plu daŭrigas tiun tradicion.

De 31.08.-07.09.1997 okazis en Romo kaj Rimini la jubilea 50-a IKUE-Kongreso sub la temo “Iru do kaj faru ĉiujn popolojn de la mondo disĉiploj”. Kadre de ĝenerala aŭdienco en placo sankta Petro la 3-an de septembro 1997 Johano Paŭlo la 2-a salutis la partoprenantojn rekte en Esperanto.

Post kiam la 2a Vatikana Koncilio (1962-1965) decidis pri reformo de la liturgio, Esperanto ricevis en aprilo 1966 partan kaj en julio 1968 plenan agnoskon kiel liturgia lingvo. La 8-an de novembro 1990 la vatikana Kongregacio pri la Dia Kulto kaj la Disciplino de la Sakramentoj aprobis la mestekstojn en Esperanto. Ekde somero 1995 ekzistas Meslibro kaj Legajaro por dimanĉoj kaj festoj.

La 11-an de januaro 1992 IKUE estis agnoskita per dekreto de la Pontifika Konsilio por Laikoj kiel internacia asocio de fideluloj laŭ pontifika juro.

Agnosko kun konsiderinda praktika graveco por la katolika Esperanto-movado estas la uzado de Esperanto fare de Radio Vatikana. Ekde januaro 1977 Vatikana Radio regule elsendas ankaŭ en Esperanto, komence unufoje en la semajno, ekde la jaro 1981 dufoje kaj ekde la jaro 1998 trifoje en la semajno – dimanĉe, merkrede kaj ĵaŭde.

Dum sia centjara ekzisto de IKUE havis 63 kongresojn en 17 landoj. Nunjare do IKUE solenas la centjaran datrevenon de sia fondiĝo okazinta en 1910. Kulmina evento de la solenado estis la 63-a Kongreso de IKUE en la urbo de la fondiĝo, do en Parizo.

*(Bildetoj de la IKUE-prezidantoj tresprenitaj el [www.ikue.org](http://www.ikue.org))*



*Papo Benedikto la 16-a*

## ŜLOSILO

Ĉiu institucio havas propran ŝlosilon de akceptado.

La Regno de Dio, diference de ĉiuj ceteraj, havas la regulojn neŝanĝeblajn. La akceptado en ĝi finas – kiel ofte estas ĉe de Dio anoncigitaj konkursoj – per paradoksaj rezultoj.

Estas akceptataj malfortaj, por hontigi la fortajn, silentemaj, por ke ili heredu la teron, malsatantaj, por ke ili estu sataj, puraj en la koro, por ke ili vidu, kion aliuloj ne vidos, insultataj kaj persekutataj, por ke ili ĝoju kaj jubilu.

*Alivorte...*

En la Dian Regnon, diference de la Eŭropa Unio, havas prioritatan eniron malgranduloj kaj malriĉuloj. Ĝi estas unu el la kaŭzoj, kial la Dia nomo ne aperis en ĝia konstitucio. Konsidere al la dua Dia ordono ĝi en la konstitucio ja estus senefika.

*D-ro Max Kaŝparů*

## EVENTOJ

### GERMANAJ ESPERANTISTAJ KRISTANOJ AKTIVAS.

En Munkeno okazis (de la 12-a ĝis la 16-a de majo 2010) la 2-a “Ökumenischen Kirchentag” aŭ Ekumena Eklezia Tago kun pli ol 80.000 vizitantoj. La ĉirkaŭ 3.000 unuopaj aranĝoj estis prezentitaj ĉefe en la Nova Foiro Riem, kie ĉeestis ankaŭ la esperantistoj: la E-Ligo por Kristanoj en Germanio aranĝis, en kunlaboro kun la E-klubo de Munkeno, la informojn, kie, sub la gvido de Karl Breuninger (kiu pretigis la budon kun Norbert Gütter), servis grupo de 4-6 esperantistoj por akcepti la vizitantojn. Oni precipe informis pri projektoj en Brazilo kaj Afriko. La prezidanto de la munkena E-klubo Fritz Hilpert klopodis havi kontakton kun aliaj grupoj. Li persone invitis Sabine Leutheusser-Schnarrenberger, justicministino, kaj Barbara Stamm, prezidantino de la bavara parlamento, viziti la E-informbudon. Li ankaŭ parolis kun delegacio de la grupo de Meitingen, kiu subtenas la beatigon de la esperantista martiro D-ro Max Joseph Metzger, kiun ekzekutis la naziistoj en Berlin-Plötzensee. La informbudon kaj la magiajan spektaklon de Triksini – kiu ankaŭ prezentis sian biografian libron – partoprenis entute pli ol 500 vizitantoj. Pluraj miloj ion eksciis pri E-o en la Nova Foiro de Riem. Foton de la budo oni povas vidi ĉi tie: [http://www.ikue.org/arkivo/oekt2010\\_a.jpg](http://www.ikue.org/arkivo/oekt2010_a.jpg) (*informis: Fritz Hilpert*).

**KRISTANAJ ARANĜOJ DUM LA UK EN HAVANO (17-24/07/2010).** Kvankam ĉi-jare dum la Universala Kongreso de E-o ĉeestis neniu oficiala reprezentanto de IKUE nek de KELI kaj neniu el tiuj organizaĵoj havis dum la kongreso sian kunsidon, tamen inter la kongresanoj ĉeestis pluraj kristanaj esperantistoj kaj okazis kelkaj programeroj speciale fokusitaj al ili. Ĉefa motoro de tiuj programeroj kaj unusola ekleziulo ĉeestanta estis sacerdoto Peter Knauer el Belgio, al kiu pro tio ŝuldiĝas granda danko. Dimanĉon la 18-an de julio ekde la 15-a horo okazis Ekumena Diservo, kiu estis antaŭanoncita en la kongresa libro, tiel ke pluraj kongresanoj eksciis pri ĝi. Bedaŭrinde, laŭ ricevitaj informoj pro malkonsento de la koncerna pastro, kiu ne favoras la ideojn de ekumenismo, la loko de la diservo devis esti post la redaktofermo de la kongreslibro ŝanĝita, pro kio, malkiel anoncite en la kongreslibro, la diservo ne okazis en la preĝejo *Corpus Christi*, tuj apud la kongresejo, sed en la preĝejo *Jesús de Miramar*, situanta proksimume 3 km for de la kongresejo. La ŝanĝo de la loko ne estis bone anoncita ene de la kongresejo pro tre limigitaj teknikaj eblecoj, kaj krome por atingi la novan lokon necesis uzi transportilon aŭ piediri dum kelkdek minutoj. Malgraŭ tiuj malfacilaĵoj tamen ĝustatempe atingis la katolikan preĝejon kaj partoprenis en la ekumena diservo kvindek da kongresanoj el pluraj landoj, inkluzive de kelkaj kubanoj. Marek Blahuš aperigis kvinda raporton pri la okazinta diservo en la tria (marda) kongresa kuriero Havano Karavano ([http://www.uea.org/pdf/havana\\_karavano\\_3.pdf](http://www.uea.org/pdf/havana_karavano_3.pdf)). Bedaŭrinde ne sufiĉe disvastiĝis la informo pri okazigo de sankta Meso samloke, marde la 20-an de julio ekde la 10-a horo, kiun sekve ĉeestis krom la celebranto nur ses pliaj kongresanoj. En siaj homilioj kaj ankaŭ en la porpetaj preĝoj, p. Knauer bone pritraktis la temon pri E-o kaj la tutmonda interkompreniĝo, interalie pri la neceso kompreni la vorton de Dio por povi profiti de ĝi, aŭ aldonante apartajn propetitajn preĝojn por la kongresa lando, ĝiaj enloĝantoj kaj la kongresanoj. Kadre de la kongresa programo pastro Knauer aranĝis en la kongresejo, jaŭdon la 22-an de julio en salono Hodler, prezenton pri sia teksto “Kredkonfeso por nia tempo” (trovebla ĉe [www.peter-knauer.de](http://www.peter-knauer.de)) omaĝe al la 100-jariĝo de IKUE. Bedaŭrinde ankaŭ tiu prelego estis nesufiĉe diskonigita ankaŭ ĉar ĝi ne aperis en la kongresa libro, pro kio nur du homoj kunlegis la tekston kun li kaj aŭskultis liajn klarigojn. Pastro Peter Knauer eble ne partoprenas tiom aktive en la publika agado de IKUE, tamen relative ofte agadas loke (interalie li aranĝas ĉiun trian monaton E-lingvan meson en Bruselo) (*el informoj de Marek Blahuš*).

**IKUE ĈE UNESKO.** Patrino Tereza el Kalkato, en la centa datreveno de sia naskiĝo, estis eminente honorigita la 14-an de septembro 2010 per memorkunveno aranĝita de la konstanta delegacio de Hindio ĉe la sidejo de UNESKO, la kultura fako de Unuiĝintaj Nacioj. IKUE estis oficiale invitita de UNESKO partopreni en la aranĝo. Reprezentis nian Unuiĝon Bruno Masala, Anne-Marie Chaney, Daniel Chevalier kaj P. Benoît Ente op.



## PERSONOJ

**FORPASIS USONA DUMVIVA MEMBRO DE IKUE.** Nur ĵusdate oni eksciis pri la morto de p. Arthur F. Rutledge. En la oficiala anonco de la Kalifornia provinco de la Jezuita Ordeno oni legas: «Li forpasis en paco la 30-an de januaro 2008 en la hospitalo la Bona Samaritano en San José, Kalifornio. Li estis 86-jaraĝa. Naskita la 18-an de februaro 1921, li eniris la Societon de Jesuo en la novicejo de la sankta Koro en Los Gatos, Kalifornio, la 30-an de julio 1938. Li eldiris la lastan votojn la 15-an de aŭgusto 1957 ĉe la Universitato de Santa Clara en Kalifornio. La funebra rito okazis la 6-an de februaro 2008 en la Kapelo de la jezuita Centro sankta Koro en Los Gatos. Li ripozas en la tombejo de la Misiejo Santa Clara en Lincoln Street, Santa Clara».

«**GRANDA ANIMZORGANTO JUBILEAS**» skribis la germana ĵurnalo “Südkurier” la 21-a de junio 2010. Temas pri Bernhard Eichkorn, kiu tiutage festis sian oran jubileon kiel pastro, 50 jarojn post la ordino. Almenaŭ 3 artikolojn pri la jubileulo (germanlingve, en 2 diversaj ĵurnaloj) oni trovas en la reto kaj ili ĉiuj pozitive mencias ankaŭ lian agadon por E-o kaj kompreniĝo inter la popoloj. IKUE-anoj ŝuldas apartan dankon al li.

## EN INTERRETO

**900 ELSENDOJ JE DISPONO.** Per la enarkivigo de la 14-a de oktobro 2010 la valora paĝaro <http://www.radio-vatikana-esperanto.org/> nun proponas 900 elsendojn en E-o de Radio Vatikana. Procente temas pri “apenaŭ” 20,80% de ĉiuj iam ajn elsenditaj elsendoj, sed la arkivo komencis funkcii nur maje de 2004, iniciate de Bruno Masala kaj kun la kunlaboro de Mike Leon, kiu redaktas la resumon de la elsendoj. La retejo devis alfronti lastatempe akran atakon de interretaj piratoj. Pro laboroj koneksaj kun anstataŭigo de elsendilo, ekde la 30-a de oktobro 2010 la dimanĉaj E-elsendoj de RV daŭras du minutojn malpli. La “tranĉo” ne koncernas nur la E-elsendojn, sed ĉiujn dumsemajnajn RV-elsendojn en tiu horaro.

**LA JUBILEA IKUE-KONGRESO EN WIKIPEDIO.** Paĝo kun fotoj pri “nia 63a” aperas en la E-versio de la fama interreta enciklopedio Vikipedio: [http://eo.wikipedia.org/wiki/IKUE-Kongreso\\_2010](http://eo.wikipedia.org/wiki/IKUE-Kongreso_2010) (*informis: Ulrich Matthias*).

**PREĜO POR PIO la 12-a.** La E-redakcio de RV estis kontaktita de asocio, kiu aktivas por disvastigi la konon pri la vivo kaj agado de papo Pio la 12-a. Ĝia reprezentanto petis la E-tradukon de la preĝo por beatproklamo de papo Pacelli. Tiu traduko nun staras frontpaĝe en la paĝaro de la asocio <http://sipastorangelicvs.blogspot.com/>

**E-PANELOJ EN LA SANKTA LANDO.** En la angla Vikipedia paĝo pri la matenlaŭda ĉanto *Benedictus*, aperas fotoj de gravurita ŝtono kun la teksto de tiu preĝo en kelkaj lingvoj, inkluzive de E-o: [http://en.wikipedia.org/wiki/Benedictus\\_%28Song\\_of\\_Zechariah%29](http://en.wikipedia.org/wiki/Benedictus_%28Song_of_Zechariah%29). (*informis: Bruno Masala*). La panelo kun la teksto en E-o de la preĝo «Benedictus» (Benata) staras en la Sanktejo de sankta Johano la Baptisto en Ain Karim (Sankta Lando), la urbo kie loĝis Elizabeta, kuzino de Maria, kaj do la loko kie okazis la Vizito de Maria al Elizabeta. La panelo, el fajenco, situas inter tiu en la greka kaj tiu en la latina. Ĝi estis starigita laŭ propono lanĉita de la esperantista franciskano p. Carlo Cecchitelli, per monkolekto de IKUE-anoj en 1989. En la Sankta Lando ekzistas tri aliaj esperantistaj paneloj: «Patro Nia», en la klostro de la preĝejo de Patro Nia en Nazareto; «Magnificat» en la Kapelo de la Vizito en Ain Karim; bildo de «Nia Sinjorino de la Espero» en la preĝejo de la Anonco en Nazareto.

**LA PLEJ FRUA KRISTANA KANTARO.** Per helpego de Karl Heinz Schäffer (Germana E-Biblioteko Aalen) Ros' Haruo sukcesis enretigi (en sia blogo «Mia Himnareto») skanitajn kopiojn de ĉiuj paĝoj de “Ordo de Diservo”, eldonita por la Tria UK (Kembriĝo, 1907). En ĝia suplemento troviĝas 26 kantotekstoj, kiuj eble konsistigas la plej fruan eldonitan kristanan kantararon en nia lingvo: <http://miahimnareto.wordpress.com/2010/07/02/ordo-de-diservo-1907/> (*informis: Ros' Haruo*).